

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 3 2019 Vendredon la 13an de sesptembro 67a jaro

Kalendaro (reviziita versio)

Ĉiuj vesperaj kunvenoj komenciĝos je la **18a 30.**

Lundon la 16an de septembro (semajno 38) *mandag*

La komunuma balotado. Ĉu la *Kommunevalget. Har vi et godt*
demokratio bone funkcias? *fungerende demokrati?*

Mardon la unan de oktobro (semajno 40) *tirsdag*

Pri/ Om la Baltaj E-Tagoj en Panevėžys, Litovio. Algis Kaspiravičius

Lundon la 21an de oktobro (semajno 43) *mandag*

Disinformado pri Esperanto *Hvordan spre informasjon om esperanto?*

Mardon la 5an de novembro (semajno 45) *tirsdag*

Studkunveno. Ni pludiskutos *Studemøte. Vi fortsetter å diskutere et*
malnetan tradukon de *utkast til oversettelse av en brosjyre om*
broŝuro pri malnovaj metioj. *tradisjonelle håndverksyrker.*

Lundon la 18an de novembro (semajno 47) *mandag*

Kiel estu tio en Esperanto? *Hva skal det hete på esperanto?*
sparkesykkel, strømme bompenger, drone ...

Mardon la 3an de decembro (semajno 49) *tirsdag*

Somera Esperanto-Studado en *Internasjonalt treff i Slovakia por*
Slovakio. Alexander Kvidbergskår *komencantoj . Forhåpentlig ved*
espereble povos veni kaj raportu. *Alexander Kvidbergskår; hvis ikke.*
Se ne, alia temo anoncota. *vil et annet tema bli annonsert.*

Lundon la 16an de decembro (semajno 51) *mandag*

Literatura vespero. Ĉiu *Litteraturkveld. Alle velger en*
prezentu iun libron. (Sed *esperanto-bok og forteller om den.*
bonvenon ankaŭ sen libro.) *(Men velkommen også uten bok).*

OKAZIS

Loĝejon ĉu aĉeti aŭ lui? (1.4)

Ni vikle diskutis, el propraj spertoj. Por povi aĉeti oni ofte devas prunti, pagante interezon. Kaj estas dependa de heredo de la gepatroj. Sed se lui, oni nur riĉigas la domposedanton, kaj mem pluhavas neniom. Eble modelo por justa sistemo estas studentloĝejoj (aŭ orienteŭropaj urboj en la komunisma epoko?), kiujn posedas la universitato aŭ la ŝtato kaj luigas je regulita prezo. Kun peza imposto sur heredaĵoj.

Venezuelo (15.4)

Venezuelo – lando kun tioma inflacio ke dekonon de la loĝantoj forfuĝis. Kiuj kulpas? kiuj povos savi la landon? Kiu estas la prezidento? Malsamajn respondojn donas la regantaro kaj la opozicio.

La forceja efiko (7.5)

Konstanta pliiĝo de CO₂ en la atmosfero rezultigas la t.n. forcejan efikon, ĉar ĝi malhelpas ellason de longonda radiado. Kulpas multaj procezoj en la moderna mondo, inter ili la kreskanta vojaĝado per aviadiloj – do nerekte ankaŭ niaj Universalaj Kongresoj.

Temoj por la landa kongreso (20.5)

Prepare al la landa kongreso ni diskutis plejparte pri Esperantonia:

kiel igi ĝin pli alloga. Plano kaŝi la malnovajn librojn ĉe la muro ankoraŭ ne efektiviĝis. Kaj nun tempas ekagi pri farbado de la listeloj ĉirkaŭ la grandaj fenestroj. Aliaj aktualaj temoj estis: la UN-asocio – proponata duobligo de la (malalta) kotizo; la kluba Vizaĝopaĝo, nova respondeculo; kaj la studorganizo, kiun la estraro proponas malfondi pro nesufiĉo da studhoroj (kaj sekve ankaŭ da ŝtata subvencio).

Pri la landa kongreso (4.6)

Pluraj el ni ĵus revenis post la landa kongreso en Tromsø. Entute 15 membroj de NEL ĉeestis almenaŭ parton de la aranĝo. Kontraŭ antaŭtimoj oni sukcesis elekti novan estraron kaj trovi novajn anstataŭantojn por Legaco Uhlen kaj la domkomisiono. Krom la jar-kunveno estis ekskursoj sur la maro kaj al la Polusa Muzeo. Ĝuindaj montaj kulisoj ĉie, mankis nur noktomeza suno.

Pri someraj aranĝoj (17.6)

Ni parolis pri la plej proksimaj E-aranĝoj ĉi-someraj: Natura E-Festivalo en Lesjöfors, UK en Lahti kaj Baltiaj E-Tagoj (BET) en Panevėžys en Litovio.

En la arbaroj ĉirkaŭ Lesjöfors troveblas multaj beroj kies

malfacilajn nomojn ni serĉis: vakcinoj (*tyttebær*), mirteloj (*blåbær*), kaj eble framboj (*bringebær*), oksikokoj (*tranebær*) kaj empetroj (*kreklings*).

Vizito el Lesjöfors (1.9)

Kromkunveno kun Lennart Svensson, iniciatinto kaj mastrumantoj de la E-kursejo/ gastigejo en Lesjöfors en Värmland. Li survojis hejmen post la itala landa kongreso. Li

rakontis pri la situacio en la gastigejo kaj skizis planon por plursemajnfina kurso.

La Universala Kongreso (3.9)

Por la unua fojo ni havas inter niaj membroj ne nur akademianon sed ankaŭ komitatanon de UEA. Sekve ni ricevis ampleksajn raportojn pri la multaj organizaj kaj kulturaj aranĝoj dum la universala kongreso en Finnlando.

Ĉu iu volas ludi kunvenambrojn? – leie møterom?

Nia kunvenejo estas ofte neuzata, sed taŭgus por kunvenoj de malgrandaj grupoj aŭ – post rearanĝo de la mebloj – ĝis ĉ 20 homoj. Ekz-e por loka sekcio de tutlanda organizo. Alloga povas esti la rekta eniro el la strato. Ĉu vi konas iujn kiuj bezonas kunvenejojn?

Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for én eller flere kvelder? Eller en helg? Vi trenger leieinntekter! Brosjyre med nærmere opplysninger og bilder.

La Mela-festivalo

Ankaŭ ĉi-jare ni starigis informbudon en la Mela-festivalo (tendo InfoBazar) sur la Urbodoma Placo, kaj deĵoris tie 17 horojn (3 tagojn). Bedaŭrinde ne la ĝusta publiko: la enmigrintoj ja devas unue lerni la norvegan. Tamen tion farinte ili havos bonan bazon por rapide lerni ankaŭ Esperanton Ekz-e *bildo* → *bilde*, hejmo → *heim*, lando → *land* – kaj hundo, cato, muso .

Duolingo-anoj ne venis

Ankaŭ en marto – junio Duolingo anoncis informkunvenojn ĉe ni por siaj kursanoj, sed neniu venis. Kvankam tutmonde (plejparte en Usono?) estas pli ol 700 000 E-lernantoj ĉe Duolingo, ni ne scias kiom el li loĝas en la Oslo-distrikto, aŭ eĉ en Norvegio.

Info-budoj en foiroj?

Se vi scias / aŭdos pri ia foiro, kunveno, konferenco aŭ festivalo, kie eblus starigi informbudon (senpage aŭ malmultekoste), **bv. sciigi tion al ni.**

Viktig: *Si fra om du vet om en messe eller festival e.l. hvor vi kan få satt opp en info-bod eller en liten utstilling. Folk vet ikke at Esperanto finnes!*

Kromekzempleroj

En la klubejo ni havas grandan kolekton da kromekzempleroj de internaciaj periodaĵoj el la lastaj jaroj: *Heroldo*, *Sennaciulo*, *Literatura Foiro*, *Kontakto* k.a. Ankaŭ multaj pli malnovaj. Venu kaj prenu!

Libroj en la vendobretaro

Per Gynt 70,- *Kalevala*, 90,-

Fenomenet esperanto. William Auld 50,-

Esperanto en perspektivo 245,- Legolibro por kursanoj 59,-

Lingvaj respondoj. Zamenhof 70,- La E-movado. Støp-Bowitz 70,-

Esperanto, över 50 miljoner träffar. Lars Forsman pri sia multjara instruado en la popolaltlernejo Karlskoga 95,-

– kaj centoj da aliaj.

Vi povas evt. pagi per Vipps 533108

Somero sen gastoj

En la lastaj someroj venis malpli da eksterlandaj gastoj ol antaŭe, kaj ĉijare por la unua fojo preskaŭ neniu! Eble ili tranoktas ĉe Oslo-membroj – aŭ eĉ trovas tranoktejon per *Coach Surfing*? Unu fakte faris tion, sed fine trovis pli oportune resti en Esperantonia.

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18*, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94
Tramo 17 al Sinsenterrassen aŭ buso 31 al Rosenhoff aŭ metroo 5 aŭ 4 al Sinsen.
Vd. pli detale interrete ĉe esperanto.no/oslo => "vojklarigo".

* inng. Schouterrassen. www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: oficejo[a]esperanto.no
Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).

Ĉi tiun *Bultenon* prizorgis Douglas Draper